„Mutig vorwärts!“ — „Kuraĝe antaŭen!“

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Delegitaro kaj Esperanto-Delegitaro de Wien.

5a jaro. No. 4 — Monata — Aprilo 1928

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.80, germanlandanoj RM 3.25, alilandanoj sv. fr. 4.25; ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug. 

Esperanto im Dienste des Fremdenverkehres.

Das österr. Ministerium f. Handel u. Verkehr (Fremdenverkehrs-Sektion) hat einen prächtig bebilderten Führer durch Österreich in Esperanto herausgebracht, der sicher viele Fremde bestimmen wird, die Schönheiten Österreichs zu besichtigen.

Durch Radio-Wien machte Walter Smital in seiner „Propagandawerbung für Österreich“ auf diesen Führer aufmerksam, was zur Folge hatte, daß eine große Anzahl von Personen des Auslandes um Zusendung des Führers ersuchte, gleichzeitig ihrer Freude Ausdruck gebend über die guten Vorträge betreffend Fremdenverkehrswerbung für Österreich. (Die diesbezüglichen Zuschriften stehen der Ravag zur Verfügung!)

Aber auch eine große Zahl der 102 regelmäßig erscheinenden Esperantozeitungen und eine Reihe von nationalsprachigen Zeitungen des Auslandes (wir führen unter anderem an: Daily Herald-London, El Mundo Obrero-Alicante [Spanien], Het Buurtbelang-Amsterdam, Amsterdam Oost-Amsterdam, Esti Kurir-Budapest, Zittauer Morgen-Zeitung u. a.) brachten Artikel über die zeitgemäße Fremdenwerbung für Österreich seitens unseres Ministeriums.

Eine große Zahl von Führern ging über Bestellung nach Ländern, in deren Sprachen keine Werbetätigkeit für Österreich gemacht werden konnte, wie z. B. Estland, Littauen, Lettland, Schweden, Rußland, Spanien, Rumänien, Japan usw., aber auch nach England, Frankreich, Italien, Ungarn usw.

Eine genaue Statistik wird nach Abschluß dieser Aktion, die durch Esperanto gemacht wurde, veröffentlicht werden.

Die Polizei und Esperanto.

Die Esperanto sprechenden Polizeiorgane in Wien, Graz, Linz, und Salzburg tragen im Dienste das Esperanto-Abzeichen und haben den Fremden durch ihre Sprachkenntnis so manche Dienste geleistet. Interessant ist, daß eine Reihe von Esperanto-Zeitungen und auch nationale das Bild dieser Polizeiorgane mit Abzeichen brachten, und zwar aus Japan, Australien, Schweden, Schweiz usw.

Internacia Pedagogia Revuo, das offizielle Blatt der „Vereinigung der Esperanto sprechenden Lehrer in der ganzen Welt“ widmet seine März-Doppelnummer den Berichten über die im Jahre 1927 stattgehabten 17 Lehrerhauptversammlungen in 13 verschiedenen Ländern.

Gegen Einsendung von 2 intern. Rückscheinen (zu haben bei jedem Postamte) erhalten Sie die Nummer bei d. Adm. Leipzig S 3, Frohburger Str. 68, p.

„Radio-Belgique“ — Wellenlänge 508.50 — gibt jeden Montag um 22 Uhr 15 letzte Nachrichten über den im August d. J. stattfindenden 20. Esperanto-Weltkongreß.

Leset die uns günstige Tages-Presse!

„Österr. Volkszeitung“ und **„Kleine Volkszeitung“** bringen häufig Artikel über Esperanto. Beide berichteten über Gründung des Int. Esperanto-Museums, den Tod unseres Obersten Zwach und brachten ein Bild der Teilnehmer des ersten Esperantokurses bei der Gendarmerie.

„Reichspost“ berichtet regelmäßig über die Esperantobewegung, so in der letzten Zeit über Gründung des Int. Esp.-Museums und den Tod des Oberst Zwach.

„Volksfreund f. d. Viertel unter d. Wienerwald“ berichtete am 17. März über den Vortrag betreffend „Bedeutung des Esperanto“ des Präsidenten Ober-Insp. Steiner in Liesing.

„Gemeindenachrichten f. d. Gerichtsbezirk Liesing“ berichteten am 20. März über dieselbe Angelegenheit.

Esp.-Gottesdienst in Wien:
22. April. 10 Uhr, I. Minoritenkirche.

Mortotago de nia neforgesebla Majstro.

Nia Majstro, tiu nobla simpla homo, vera homo, kun ora koro, tiel profunde sentanta por la suferanta homaro, mortis la 14. de aprilo 1917 je kormalsano en Varsovio dum la kruela mondmilito.

Li postlasis ne nur sian funebrantan familion, sed ankaŭ funebrantan vastegan familion tudmondan. Ĉiuj homoj, kiuj Lin persone konis aŭ iam en kongresoj vidis, ekamis, ja ekŝatis Lin kaj kortuŝite sciiĝis, ke tiu „homo" mortis.

Tiam nia hungara E.-poeto Julio Baghy, militkaptito en Siberio, verkis jenan strofon:

La famon ne brue,
nur poste malfrue,
simile al eho de mortkrio
mallonga sciigo alportis:
„La Majstro mortis".

Je malbonega vetero la 16. de aprilo oni transdonis la mortpovajn restojn de l' Majstro al la tero. Nur malmultaj personoj ĉeestis la funebron, ĉar la tutmonda adeptaro pro la milito ne povis veni Varsovion. Sed dek jarojn poste, la 5. aŭgusto 1927, reprezentantoj el multaj landoj el ĉiuj partoj de la tero — la suno tiel agrable brilis — post Danzig estis venintaj al Varsovio poste fari, kion la milito siatempe malpermesis al ili, honori la memoron de nia Majstro ĉe lia tombo. Ili havis la malĝojan okazon funebri nun ankaŭ pro la morto de la senlaca helpantino de la kara mortinto, de lia edzino Klara, kiu mortis post Wien-a kongreso la 6. de decembro 1924.

Pri la funebro de d-ro Zamenhof skribis Leo Belmont, nia malnova Esp.-poeto kaj kunbatalinto de d-ro Zamenhof de l' komenco de la movado, jene:

En tago malluma, malvarma, pluvanta
ni Majstron venigis al lasta ripoz' . . .
ĝi estis ne pluvo, sed ploro kantanta,
ĝin kreis el larmoj anĝel-virtuoz'.

Ne bruis por Majstro la verdaj standardoj,
de miloj da koroj ne iris la son'!
Tra limoj fermitaj ne venis lernantoj,
alfluis mokante nur bru' de kanon'!

Irado funebra mokante atestis
pri vero maldolĉa, pri sorta sever',
ke fremda al sia genio — ve! — estis, —
Neniu profeto en propra la ter'!

Ne venis Polujo kadavron honori
de filo pollanda, de monda saĝul' —
La mond' malproksima Lin sciis priplori. —
Sename kaj moke bruadis Vistul'!

Malriĉaj Hebreoj nur venis post ĉerko,
ĉar mortis bonkora helpant' — okultist';
sed ili ne sciis pri granda la verko,
ne sciis, ke mortis la mond'bonfarist' . . .

Nur iris post ĉerko vidvin', ĉagrenita
kaj florojn portanta fidel' amaset'. —
La korojn vi havas, Poluj': enskribita
en ili do estas, ke mortis profet'!

Malriĉa funebro en tago pluvanta,
de lasta adiaŭ honormanka hor'!
La tombo modesta, la tomb' esperanta! . . .

Sed restis Lia verko!

Ni esperantistoj plej bone honoru Lian memoron, flanke lasante personajn ambiciojn, ĵaluzon kaj envion — en komuna laboro por Lia grandioza verko, nia sankta afero en vere Zamenhofa spirito.

Memoru ĉiam la mortotagon aĉetante librojn el la Originala Esperanto-Literaturo, kiel proponis en trafa maniero nia samideano Nikolao Hohlov-Moskvo!

Kiu ne ankoraŭ aĉetis tiajn nunjare, tuj postfaru tion!

Kaj nun la esperantistoj tutmondaj komencis starigi por nia d-ro L. L. Zamenhof eternan monumenton per kreo de Internacia Esperanto-Muzeo kun la sidejo en Wien.

La detalojn pri ĝi vi eksciiĝis el la gazetaro. Kunhelpu ĉiuj: gazetaro, eldonejoj, la naciaj societoj, unuiĝoj, societoj, rondoj kaj izoluloj, por ke tiu verko en la koro de Eŭropo estiĝu inda monumento por nia Majstro kaj ĉiama propagandilo por Lia verko!

Franz Zwach †.

Ofte en lasta tempo kunvokis funebra sonorilo la samideanojn de Wien. Sed nur malofte granda anaro — preskaŭ ducent personoj — antaŭ ĉerko staris tiom emociite, tiel dolorskuate, kiel la 24 an de marto nunjara.

Post doloriga malsano longe daŭrinta, la 21 an de marto, forlasis nin ekskolonelo Franz Zwach, al kiu nia literaturo dankas interalie la Esperantotradukaĵon de „La Malŝparulo“, sorĉfabelo de Ferdinand Raimund, kongresteatraĵo de nia XVI a.

Vera poeto li estis. Ne stila majstreco sole, ne la profunda sentkapablo sola lin aperigis poeto: Homo nobla li estis antaŭ ĉio. Helpi, servi li emis konstante; rigora kontraŭ si mem li kompreneme defendis aliajn; lia toleremo ne malhelpis lin, esti justa; sentemeco de l' poeto ne ŝancelis la animfortecon de la viro en suferad' portata paciencege. Sed du karakteraj trajtoj precipe distingis lin modelo por esperantistoj: treege diligenta (li laboris ja senĉese) kaj — modesta li estis, treege modesta. Al nia lingvo ne mankas vorto konciza resumanta ĉion ĉi: Zamenhofeca li estis.

Ĉar lia nomo ne malaperos plu el nia literaturo kaj el la historio de l' aŭstria movado, kelkaj datoj pri la vivo de „la kolonelo“ restos interesaj.

Franz Zwach naskiĝis en Teltsch, Moravio, la 29 an de sept. 1856, filo de l' tiea kuracisto palaca. Li elektis la oficiran karieron. Interesa estas la maniero, kiel iĝis li esperantisto. En 1906, ĉe kegloludado, d-ro Skalkowsky-Lemberg menciis en societa rondo Esperanton. Zwach ekinteresita, aĉetis libreton pri ĝi. Post 8 tagoj jam li povis ekparoli al la doktoro en Esperanto, je granda ĝojo de ambaŭ.

De tiam studis li de jar' al jaro pli intense. Rezultis baldaŭ serio da verkoj. Presite aperis „Poeziaĵoj de Schiller“, inter ili „La kanto pri la sonorilo“; „La malŝparulo“ de Raimund; en la lasta duonjaro: la tekstoj en „Katolika kantaro“ kaj en ĉiuj la jaroj zorge pripensitaj, belstile skribitaj recenzoj en la aŭstriaj E.-gazetoj. Li postlasis tute pretan tradukaĵon de „Altarbaro“, la plej konata verko de la aŭstria epikisto Adalbert Stifter, kaj riĉenhavan poemaron. Ambaŭ verkojn baldaŭ publikigos laŭeble A. E. D.

La stilo de Zwach estas plejparte tre simpla, klara kaj glata. Ritme fluas la dolĉa lingvaĵo. Sed ankaŭ plastikiga ĝi estas, ĉar la aŭtoro estis, kiel vera poeto, lingve produktkapabla. Profunde konante la ideenhavon de la elementoj, la misterojn de ilia kombinebleco li ofte surprizas per novaj formoj malnovdevenaj. Slava moleco kuniĝis kun germana prudento. Fiere li sin nomis „disĉiplo de Christaller“.

Lian personan agadon karakterizas nepra servado al nia afero, ĉiuokaze nobla servado. Kvankam oficiro malnova li laboris kun laboristoj; estante protestanto li verkis por katolikoj; altŝatante kaj admirante germanojn li rekreis esperantlingve la ĉeĥan himnon nacian. Pasie li subtenis la blindularon. Tia li estis eknomata honora membro de „Unua E.-Unuiĝo“, „Danubio“, „Fideleco“ kaj „Rondo de Blinduloj“. Du ĝojojn li ne plu povis ĝisvivi: La malfermon de „Internacia Esperanto-Muzeo en Wien“, al kiu li tamen anis estante membro de ĝia Int. Kuratora Komitato. Al la muzeo li dediĉis lastavole sian tutan E.-postlasaĵon. Due: En nia Lingva Komitato li estis anstataŭonta s-anon Schröder mortintan. Atingis lin ankoraŭ nur la sciigo de prezidanto Cart pri kandidateco.

Fakte do ĉi tiu perdo estas granda: talento perdiĝis, sukcesa diligentulo foriĝis, neforgesebla amiko foriris por ĉiam.

Adiaŭante lin ni ne forgesu unu devon: Danki al lia bona anĝelo, kiu tiom longe lin konservis al ni; al lia modela edzino, kiu — mem grave malsana — lin flegis senripoze ĝis la lasta momento kaj fidele lin apogis en la tempo postmilita terura por ambaŭ.

Al ŝi kaj al la tuta respektinda familio ni esprimas kondolencon sinceran. Sed al nia elmondiĝinto ni vokas:

„Gloron vi neniam aspiris; tial estu gloro al vi!"

Por „Aŭstria Esperanto-Delegitaro":
Hugo Steiner, prez.

*

Post la enteriga funebro de nia Zwach, parto de la funebrantoj iris al la tombo de l' unua prezidanto de „Bohema Klubo Esp." Macháček. De sur la tombŝtono ni legis:

„Nia kara prezidanto!
Tie ĉi subtere putras nur la korpo morta,
Sed ĉe ni animo Via restas kara, forta;
En dolor' senfina, ni konsolon havu nune,
Ke ni nin revidos en la eterneco kune.
Bohema Klubo Esperantista en Vieno."

*

Kortuŝite mi dankas al la societoj „Unua E.-Unuiĝo", „Danubio", „Fideleco" kaj „Blindaj Esperantistoj" kaj al ĉiuj samideanoj, kiuj alportis florkronojn kaj bukedojn al la ĉerko de mia neforgesebla kara edzo, krome al ĉiuj, kiuj tiel multnombre venis, por lastan fojon honorigi lin.

Koran sinceran dankon!

Valerie Zwach.

IIa Raporto de „Intern. Esp.-Muzeo en Wien".

I. Liebiggasse 5.

A. Propagando:

1. Leteroj IEM-celon klarigantaj al la naciaj societoj; sudslava jam respondis, ke ĝi subtenos.

2. 95 E.-gazetoj ricevis raportan artikolon pri la fondo de IEM por represo. Jam raportis „Heroldo de E."-Horrem ĉe Köln, Germ.; aliaj promesis la aperigon en venonta numero.

Pro alsendo de pruvekzempleroj ni ĝentile dankas; same pro regula sendado de ĉiu ĵus aperinta n-ro al IEM, kion kelkaj jam ekpraktikis.

3. Fakte grandan efikon havis duonhora Radio-parolado farita la 19. III. nj. de nia prezidanto ĉe „Radio-Wien" pri la fondo de IEM. Ĝi ne nur kaŭzis multajn leterojn aprobantajn kaj alsendon de materialo, sed ankaŭ tre efikis propagande en la ne-esp.-ista publiko, ĉar multajn konvinkis tia grava fakto.

B. Materialo ricevita:

Laŭ donaclistoj:

N-ro 1 „Cosmoglotta" — Mauer (Sistemo „Occidental");
N-ro 2 „Esperantista Junularo" — Leipzig;
N-ro 3 Org.-Kom de VIII. SAT-Kongr. — Göteborg;
N-ro 4 Holanda E.-Oficejo — Haag;
N-ro 5 H. J. Bulthuis — Haag;
N-ro 6 Inte Ĉaĉe — Riga;
N-ro 7 Adalb. Smit — Haag;
N-ro 8 Franz Zwach † — Wien (Tuta postlasaĵo).

C. Mono alveninta:

Grandkomercejo R. Herzmansky, VII., Mariahilferstr. 26 . aŭ. S 500.—
Heredaĵo post E.-Asocio † „ „ 67.—

Subtenantoj: Pojare sv. fr. 2·— A. Smit-Haag; S 10 dir. Horneck-Graz; po 5 d-rino Smital-Wien, Marie Steiner-Bisamberg, Sophie Cipera-Linz; S 2 Faderbauer-Obersulz; po S 1·— Fr. Brückl-Bockfliess, Antonie Bauer-Korneuburg, kolonelo Hackl, Wil. Rogler-Graz; Ĉech, instr. Dittrich, E. Werner, Jos. Zimmermann, Anna Tomasek, Gabriele Zehender, Amalie Krebs, Christine Rösel, pr. policistoj Berthold, Bedlan, Kucera, Baumgartner, Edelsbrunner, Vuerich, Novosad, Michel, Philipp, Bruckner, Maier IV, Marchhart, Blaha, Höller, Schwarz, Schleinzer, Schmidl, Kraus, Wessner, Seibt, Berghammer, Bayerl, Hajek, Seisenbacher, Manzer, Skrob, Nemecek, Grois, Orthofer, Vogler, ĝend. ofic. Siml-ĉiuj Wien, Hugo Steiner j., Lothar Steiner-Bisamberg, ĝend. of. Ertl-Oberlaa, Berndl-Zwettl, ĝend. of. Hermann kaj Fessl-Atzgersdorf, ĝend. of. Burger-Exelberg.

Sekvu la aliaj, sendante en poŝtmarkoj almenaŭ S 1·— kiel pojara membrokotizo kaj 20 gr por la membrolisto.

Ĉ. Korespondo:

Jen kelkaj ekzemploj tipaj, kiuj pruvas, ke ni marŝas sur la ĝusta vojo.

E.-ista Klubo-České Budějovice: 17.III.1928.
La sciigo pri fondo de „Internacia Esperanto-Muzeo" en Wien treege entuziasmigis la membrojn de nia klubo. Tuj estis aranĝata kolekto da mondonacoj kaj malnovaj

esperantaĵoj, kiujn ni sendos iom post iom al vi.

Unuanime gratulas vin ĉiuj geklubanoj, ĉar pli konvenan urbon ol estas la belega Wien, oni ne povus elekti en nia kontinento.

Tial ni esprimas la sinceran deziron, ke la Internacia Esperanto-Muzeo fariĝu vere centra allogejo por ĉiuj Esperantistoj, kie ili povu admiri la grandegan laboron de nia Majstro kaj de miloj da meritplenaj Esp.-pioniroj, ilian ofereman sindediĉon al la genia ideo, kiu kondukas la homaron el konfuza labirinto al klara vojo de kompreno kaj kunlaborado por la progreso kaj pli feliĉa ekzistado, pri kiu sopiras ja ĉiuj homoj. Vivu IEM!

Samideane via Jan Rambousek.

Ing. Willy Heinze-Oberlössnitz: 19.III.1928.

„... Jam nun mi promesas al vi subtenon de via entrepreno ... Dankon pro via grava laboro por nia komuna afero!"

Direktoro Adalb. Smit de „Holanda E.-Oficejo"-Haag 4. IV. 1928.

„Pri via ĝojiga komuniko koncerne IEM mi tiom entuziasmiĝis, ke mi tuj decidis fariĝi private membro kaj donacanto, kiel direktoro de HEO. donacanto. (Mi zorgos, ke estos sendataj ĉiuj E.-aĵoj eldonitaj de HEO. ĝis nun.)

Mi esperas per tio ĉi, ke mi sufiĉe klarigu kaj esprimu al vi kaj al la ceteraj Vien-anoj, kiujn mi tiom ĝojkore memoras, ke mi profundkore ŝatas la gravan laboron de vi ĉiuj faritan kaj farotan. Laŭ mia opinio estas la kreo de Internacia Esperanto-Muzeo unu el la plej gravaj paŝoj antaŭen je la vojo al aŭtoritatigo de la Esp.-ideo; ĝi pli ol iam antaŭe rigardigos je nia movado kiel „science elpruvita"; kaj tial kaj pro dek aliaj bonaj kialoj mi promesas el tuta, ĝojplenigita koro helpi laŭ miaj modestaj fortoj al la pliriĉiĝo de via entrepreno.

Esprimon de granda estimo, samideane via."

Por LKK: Steiner, prez.; Smital, sekr.

Informu viajn korespondantojn alilandajn pri la muzeo, **invitu** ilin pro **aneco** (almenaŭ 5 respondkuponoj en simpla letero) kaj pro **sendado** de materialo. Ili tuj vicevos de ni „Tra Aŭstrio", membrokarton kaj kvitancon.

VIII a SAT-kongreso

okazos 14.—19. de aŭg. en Göteborg. Ankaŭ ne SAT-anoj rajtas partopreni, ĉar okazos ankaŭ diversaj fakkunsidoj. Por ĉiuj aŭstrianoj estas la kotizo Ŝ 3.50. Adreso: Organiza Komitato de Mondkongreso, Box 73, Göteborg, Svedujo.



La Urbo de nia XXa.

Niaj praavoj, germanoj de saksa sango, estis ekloĝintaj sur la dekstra Skeldobordo, verŝajne en la 6a aŭ 7a jarcento kaj tie konstruis enŝipiĝejon. De tiu lasta vorto en flandra lingvo „Werf" devenus la nomo „Antwerpen" (aen 't — Andwerf, Antwerp = ĉe le enŝipiĝejo). Pli populara estas la legendo pri giganto Druon Antigoon, kiu forhakis la manon (Flandre: „Hand") de ŝipistoj rifuzintaj pagi imposton, por ĵeti (Flandre: „werpen") ĝin en la Skeldon. Kuriozaĵo estas, ke en la blazono de Antverpeno ankoraŭ troviĝas du manoj.

La fortikigita kastelo, naskejo de la urbo, estis detruita de la normanoj. Malrapide tamen ĝi ree leviĝis kaj en la 12a jc. vivis ĉi tie jam ampleksa loĝantaro de komercistoj.

La komerco ja kaŭzis la floradon de Antverpeno. Precipe en la 16a jc., pro la defalo de Bruĝo Antverpeno iĝis la plej grava komerca centro de Eŭropo.

Fidinda atestanto pri tiu tempo estas italo Guicciardini, kiu travojaĝis Nederlandojn, pri kiuj li donis priskribon eldonitan en 1567 en la fama antverpena presejo de Kristoforo Plantin, reĝo de la tipografiistoj de sia tempo. Lia ege interesa domo kun laborejo kaj butiko estas konservata ĝis nun en sia originala stato kaj vizitebla de la publiko.

Guicciardini taksas la nombron de fremdaj komercistoj en Antverpeno je mil kaj la loĝantaron je 100.000 ĝis 150.000 okaze de la foiroj. Kelkfoje oni vidis sur la Skeldo ĝis 2500 ŝipoj, inter kiuj multaj devis atendi de du ĝis tri semajnoj antaŭ ol ili povis malŝarĝiĝi.

Krom la komerca prospero la industrio plene floradis. Ekzistis multaj fabrikejoj de drapo kaj ĉiuspecaj silkoj. La antverpena veluro estis ĉie konata. De 1415 oni teksis tapiŝojn. La veturilfarado kaj vitropentrado okupis multajn en Antverpeno, kie eĉ estis troveblaj kanonfandejoj.

Plie ekzistis potencaj gildoj aŭ korporacioj kaj inter ili tiu de la bierfaristoj kun 200 membroj. „Gerstenbier" (hordea biero) estis tre ŝatata kaj eksportata eksterlanden. Antverpeno ankaŭ de tiam famiĝis pro siaj diamantpolurejoj laŭ metodo, kiun la Bruĝano Ludoviko Van Berkem eltrovis. Estus tre interese por la kongresanoj, viziti modernan diamantlaborejon.

Antverpeno estis metropolo de flandra arto. Albrecht Dürer, kiu loĝis tie ĉi en 1520, konfesis, ke li ne vidis en Germanujo tiajn fieregajn palacojn kiel en la Skeldurbo. En 1518 la belega katedralo gotika kun sia gracia turo, 123 metrojn alta, estis fine konstruita post du jarcentoj da laboro. Laŭ Schiller ĝi estas la plej bela preĝejo de la kristaneco post tiu de Sankta Petro en Romo.

La riĉeco de Antverpeno bedaŭrinde pereis pro la religia batalado dum la hispana regado kaj en 1648 la fermo de Skeldo, pro la kontrakto de Münster donis la mortigan baton.

La denaska artema naturo de la antverpen-ano tamen glore riveliĝis en tiu tempo de malprosperado. Heredintoj de la famo de Quinten Matsys, la lasta reprezentanto de gotika flandra pentroskolo aperis figuroj kiel Rubens, Van Dyck, Jordaens, Teniers, Quellin, kaj aliaj pentristroj kaj skulptistoj, kiuj por eterne fiksis la prestiĝon de la flandra pentrarto. En muzeoj kaj preĝejoj iliaj ĉefverkoj estas admirataj.

Skeldo, tiu fonto de riĉeco de Antverpeno kaj de tuta Belgujo, estis denove malfermita por la ŝipveturado de la unua Franca Respubliko en 1792 kaj precipe dum la regado de Napoleono I. la komerco ree ekfloris kaj poste daŭre prosperis, precipe kiam en 1863 la impostoj, kiuj devis esti pagataj al Holando, estis forigitaj.

La haventrafiko post 1900 triobliĝis (en 1926: 11.599 ŝipoj — 22,794.895 t.). La regule al Antverpeno veturantaj ŝiplinioj nombriĝas ĝis 200. Fakto nemiriga, kiam oni konas la favoran situon de nia haveno, ĝiajn bonegajn instalaĵojn kai ilaron kaj ĝian malmultekostecon. Novaj gravaj laboroj estas komencitaj kaj post 1930 la tuta dokaro havos areon da almenaŭ 550 Ha.-Vizito al la haveno estos organizata dum la proksima universala kongreso.

Moderna Antverpeno same kiel la haveno ĉiam plivastiĝas. Ĝi estas la plej granda urbo de Belgujo (300.000 da enloĝantoj — 500.000 kun la antaŭurboj). Plej gravaj estas ĝiaj industriaj institucioj, inter ili la diamantfacetado.

Je ĉiu vidpunkto Antverpeno estas vizitinda. La Reĝino de la Skeldo, kiu tiel gastame akceptis la esperantistojn dum la 7a Kongreso en 1911, sin pretigas por agrabligi kaj plej interesigi la viziton de kelkaj miloj da kongresanoj en la venonta monato aŭgusto.

Je ĝia nomo la gesamideanoj el la tuta mondo estas kore invitataj!


Jam aliĝis kelkcent. La nomoj de la unuaj ducent estas publikigitaj. Oni povas konstati, ke el Aŭstrio nur malmultaj ĝis nun aliĝis.

Do rapidu kaj tuj aniĝu!

S-ro Steiner, prez. de la prepara komitato por Antaŭkongreso en Wien 1929, aliĝis kaj anoncis en la kadro de la kongresaranĝoj lumbildparoladon pri „Wien kaj vojaĝoj en Aŭstrio", por montri al la kongresanoj la belaĵojn de nia lando kaj inviti ilin al XXI. en Budapest kaj Antaŭkongreso en Wien.

Informoj: Kotizo 35 Belgojn (egalas Ŝ.). Pasportvizon ni bezonas por Belgujo, sed LKK. klopodas, rabatigi aŭ senkostigi ĝin. Skribu tuj pro loĝigo, por ke vi ricevu malmultekostan loĝejon. La prezoj ne estas altaj; oni pagos por ĉambro B. 4 sen matenmanĝo, por ĉi tiu B. 1, tag- aŭ vespermanĝo po B. 2—5.

VIIIa Aŭstria Esperanto-Kongreso.



Urbdomo en Korneuburg

Inter la urboj de Nieder-Österreich Korneuburg apartenas al la plej interesaj pro sia situo kaj historio. Depost antikva tempo loĝata, dum bronzepoko jam koloniata tero ĝi estas, kiu portas la urbon, kies estiĝo estas ege ligita kun tiu de Klosterneuburg. El antaŭloko de Klosterneuburg, dise situa ĉe ambaŭ bordoj de Danubo kaj sur insuloj, ĝi fariĝis vilaĝo de fiŝkaptistoj, en kiu ekloĝis dum porkruca militiro ĉiam pli kaj pli da komercistoj, kaj en la 13. jc. ĝi jam estis floranta komercurbo.

Sed jam la sekvinta jc. devigis la regnestrojn aliigi la komercurbon en fortikaĵon. Dum kvar jc. la urbo toleris ĉi tiun sorton, la turkoj venis ĝis ĝiaj muroj, ĝi estis konkirita de la svedoj kaj venkreakirita de la imperiestruloj. La 18. jc. alportis la pacon sed nur dum mallonga tempo, ĉar jam komence de l'19. jc. franca marŝalo Massena rajdis kiel venkinto en la brulantan urbon. Per tio la strategia rolo de Korneuburg finiĝis kaj kio restis, estis nur torso de iama komercurbo.

La historian destinon, kiel fortikaĵon konigas la urbplano: Ortangula ĉefplaco, sistemo de ortangule kruciĝantaj stratoj, la ankoraŭ nuntempe potence efika urbdoma turo, kiu servis kiel observa turo, „Luginsland" (rigardu en la landon) de la fortikejo.

Malmulte restis el ĉi tiu historia tempo. Kion oni trovis, zorgeme estas kolektita en la urba muzeo, kie apud trovaĵoj el la ŝtonepoko kaj de argilaj vazoj el prahistoria epoko troviĝas pafiloj, ŝtonkugloj ktp. el la mezepoko, kvazaŭ la historio ne estus unu-post-aliaĵo, ne antaŭenpaŝado, sed unu-apud-aliaĵo, trankvila haltado.

D-ro Josef Fickeis.

En la urbdomo ni verŝajne havos la duan laborkunsidon. La programo ne ŝanĝiĝis, restas

kiel jam anoncita en la antaŭaj numeroj. Precizajn detailojn A. E. publikigos en maja numero.

Jam anoncis sin aro da partoprenantoj! Vi ĉiuj plifaciligus al LKK. la laboron — tuj mendante la kongreskarton. Adreso: Baden: Bahngasse 2. Por LKK: Pronay, prez.

Programo de la laborkunsidoj:

I. Raportoj de: a) prezidanto, b) kasisto, c) organiza ref., d) gazetservo, e) landestroj.
II. Organizaj demandoj: a) ŝanĝpropono de E.-soc. p. Stirio (vidu pĝ. 44), b) laborprogramo por AED. (propono Danubio).
III. Elektoj.
IV. Kotizoj.
V. Antaŭkongreso 1929.
VI. Proponoj.
VII. Eventualaĵoj.

Por AED.: Steiner, prez.; Werner, sekr.

Vojaĝu al Budapest-a Foiro.

Budapest-a Foiro invitas la esp.-istojn per belega 8 paĝa E.-broŝureto, ilustrita per 14 bildoj, al vizito. Ĝi okazos 28. de aprilo ĝis 7. de majo.

Sed grave por ni estas, ke el Zagreb, Praha kaj aliaj lokoj venos samideanoj eĉ en karavanoj. Estus tre efikige, se ankaŭ el Wien sufiĉe granda nombro veturus al Budapest.

La samideanoj el Wien veturos al Budapest la 5. de majo per ŝipo (rabato 50%) je la 8. h. mat. Ili restos en Budapest ĝis la 7. majo kaj ĝuos la saman rabaton je reveturo. Necesas, ke ĉiu ĝustatempe, kunsendante la monon, mendu foirkarton de s-ro Paŭlo Balkányi, Budapest, VI., Hajós-utca 15, kiu ankaŭ peros loĝejon ktp. La foirkarto kostas 4 Pengö kaj nur ĝi donas al vi la favoraĵojn. Je 4 Pengö vi jam ricevos en bona hotelo ĉambreton; je 1 P. matenmanĝon, je 1.50 ĝis 2.— jam tag- resp. vespermanĝon + 10% trinkmono.

Veturontoj informu s-ron Steiner, Korneuburg, Postfach 26, kiu nepre veturos al Budapest.

La samideanoj en Budapest en konata gastemeco montros al ni ĉiujn vidindaĵojn de ĉi tiu belega urbo.

Veturu multnombre!

Helpu tuj!

La danaj radiostacioj Kopenhago kaj Kalundborg ĉesis subite la disaŭdigojn de E. Skripu multnombre kaj tuj al Statsradiofonien, København, ke vi kun granda intereso aŭdis la disaŭdigojn de ambaŭ stacioj kaj miras, kial ili nun ĉesis.

Renkontiĝo de esp.-istoj en Böhmerwald 1928.

Kie limiĝas Aŭstrio, Ĉeĥoslovakujo kaj Germanujo, tie etendiĝas „Böhmerwald", en kies centro proksime ĉe la trilandangulo troviĝas „Blöckensteinersee" (lago). Tie naskiĝis Adalbert Stifter, la poeto de Böhmerwald, kaj sia plej fama „Hochwald" (Altarbaro) scenas tie.

Tri urboj en la najbaraj landoj estas la elirpunktoj por vojaĝi tien: Krumau, Linz, Passau.

Ni invitas la esperantistojn el Aŭstrio, Ĉeĥoslovakujo kaj Germanujo, kiuj ne povas veturi al la mondkongreso — Antwerpen, kunveni la 29. jul. ĉe la limŝtono de la tri landoj. Ni vizitos „Dreisesselberg" (monto), „Blöckensteinersee", Stifter-monumenton ktp. la 30. jul.

En la menciitaj urboj la laboroj komenciĝis. Detaloj sekvos.

Supra-Aŭstria E.-Societo.
Linz (Gasthof „Stadtgut").

AED. oder ÖEB. (Österr. E.-Bund)

Der E.-Verein für Stmk hat am 16. Februar l. J. an sämtliche österr. E.-Vereine, deren Adressen ihm von der AED bekanntgegeben werden konnten, ein Rundschreiben versendet, worin er seine Meinung begründet, daß es für die Zukunft unserer Bewegung zweckmäßiger wäre, die seinerzeit nur provisorisch geschaffene lockere Organisationsform der AED. in eine fester gefügte unter dem Namen „Österr. E.-Bund" umzuwandeln.

Daß diese Meinung auch von anderen österr. E.-Gruppen geteilt wird, beweisen zahlreiche beim E.-Verein für Stmk. eingelangte grundsätzlich zustimmende Zuschriften aus Wien und der Provinz.

Dieser Plan stand bereits auf der Tagesordnung des vorjährigen österr. E.-Kongresses, mußte jedoch wegen Mangel an Zeit und Vorbereitung wieder abgesetzt werden. Um beim heurigen Kongresse die Angelegenheit zu einem befriedigenden Abschlusse zu bringen, hat der E.-Verein für Stmk. die Form des schriftlichen Meinungsaustausches gewählt, da es den Provinzgruppen an Gelegenheit fehlt, gleich den Wiener Gruppen, in regelmäßigen Zu-

sammenkünften derartige Fragen für den Kongreß vorzubereiten.

Unser Rundschreiben war noch nicht als Antrag gedacht, wie aus der Notiz des A. E. (März Nr. 3, Seite 33) irrtümlich entnommen werden konnte, sondern sollte nur die notwendige Grundlage zur Verfassung eines beim Kongresse erst einzubringenden verhandlungsreifen Antrages schaffen. Wir bitten daher nochmals dringendst alle Gruppen und Einzelmitglieder, uns ihre Meinung zu dieser Organisationsfrage ehestens bekanntzugeben, soweit dies noch nicht geschehen ist. Zuschriften sind zu richten an den Schriftführer d. E.-V. für Stmk. Wilibald Rogler, St. Peter bei Graz, Gartenstr. 11/2. St.

Bei dieser Gelegenheit betonen wir ausdrücklich, daß Personenfragen weder Ursache noch Gegenstand unserer Vorbereitung sind.

Eine letzte Besprechung in der Angelegenheit „Österr. E.-Bund" wäre in Baden am 27. Mai um 11 Uhr vormittags möglich.

Für den Esp.-Verein f. Stmk, Graz:
K. Hackl, Vors., W. Rogler, Schriftführer

La minimumo.

S-ano Johannes Karsch, komitatano de UEA, Dresden en bonega artikolo alludas la ĉiaman oferemon de nia Majstro kaj opinias, ke multaj esp.-istoj havas la emon, laŭpove sekvi la ekzemplon de d-ro Zamenhof.

Li diras: Ĉiu el ni devas 1. esti organizita nacie, tio kostas inkl. kotizo de la loka kaj landa societoj kaj la prezo de la nacia gazeto (por Aŭstrio pksm.) . . . . Ŝ 7.—
2. esti internacie organizita en UEA. kiel MA . . . . „ 12.50
3. aboni „Heroldo de Esperanto" „ 20.—
Ŝ 39.50

kaj ni diras 4. esti membro de „Intern. Esperanto-Muzeo" (pri tio Karsch ankoraŭ ne sciis) . . . . „ 1.20
Sume Ŝ 40.70

Laŭ la kalkulo de Karsch ĉiu celkonscia germanlanda esp.-isto devas elspezi pojare 58 Rm. = Ŝ 66.—.

Pripensu tion!

Internaciaj Floraj Ludoj.

Kiel kutime la solena festo okazos dum la 15a Kongreso de Kataluna E.-a Federacio. Lasta templimo por alveno de manuskriptoj: 15a de majo 1928.

Pri informoj skribu al la sekretario de Floraj Ludoj, carre Valencia 245, Barcelona.

Filozofia Rondo Esperantista.

Fondis ĝin T. W. Teich, landsekretario de „Interniaro", Hansa-Allee 249, Düsseldorf-Oberkassel. Apartenas al la E.-movado amikoj de la plej diversaj filozofiaj sistemoj. Progresemuloj scias, ke estas bone, pliriĉigi seninterrompe sian pensaron per taŭgaj ideoj de aliaj. Tial la filozofiemaj esp.-istoj unuiĝis en rondo por interŝanĝe malfermi siajn internajn saĝtrezorojn. „Interniaro" afable al ili disponigis siajn paĝojn. (El Int. Pedagogia Revuo.)

Unua Int. Literatura Konkurso de E.

Hispana E.-Asocio organizas ĝin dum sia 7a Hispana Kongreso de E. en Sevilla (5.—9. nov. 1928.)

Pri la detalaj informos la Sekret.-kasisto Martinez strato Sevilla.

Tutmonda Presa Ligo.

Ĵurnalistoj, redaktoroj, verkistoj kaj gazetfakuloj aliĝu!

Sendu artikolojn pri politikaj, sciencaj kaj beletristikaj aferoj al la centro. Vi reciproke ricevos de ĝi materialon el la tuta mondo, kiun vi prezentu al la gazetoj vialandaj. Vi per tio servos nian movadon kaj povas gajni monon per gazethonorarioj.

Do helpu fondi T. P. L.!

Detalan planon pri organizo mendu de redaktoro F. W. Mischke, Radeberg apud Dresden.

Aĉetado de libro per antaŭmendo.

Verkehrsbüro, I., Friedrichstr. 1 eldonas „Führer durch d. Sommerfrischen und Wintersportplätze Österreichs" (Vol. Kärnten Ŝ 2.50, Tirol kaj Vorarlberg Ŝ 3.—) „Aŭstria Hotelbuch 1928", prezo Ŝ 3.50 kaj „Fahrbegünstigungen f. Jedermann" (Ŝ 1.—).

Niaj legantoj ricevos, tuj mendante, la librojn kun 10% rabato, se ili mencios A. E. — Ne forgesu tion!

Eldona Societo Esperanto, poŝta fako 698, Stockholm eldonis belegajn poŝtkartojn kun la portretoj de d-ro Zamenhof kaj Andreo Ĉe. Prezo po sv. fr. 0·15 afrankite Minimuma kvanto mendebla: 10 pecoj. Ekspedo nur kontraŭ antaŭpago, prefere per UEA-kuponoj.

The Esperanto Publishing Company Ltd. fondiĝis por stimuli la eldonadon de altklasa E-literaturo en Britujo. La unuaj direktoroj estas s-roj R. Robertson, Edm. W. Willcocks kaj C. C. Goldsmith. Ĝi estas tute sendependa de Brita E.-Asocio, sed ambaŭ kunlaboras plenharmonie. La kompanio faros komercon nur pogrande; detalajn mendojn plenumos Brita E.-Asocio.

La unua libro eldonota: „Pri la origino de l' homo", verkita de prof. Sir Arthur Keith, estas lia prezidanta prelego en 1927 al „Brita Asocio por la progresigo de la scienco" kaj kaŭzis multan polemikon. La E.-traduko estas de s-roj prof. W. Brown kaj McCormick. La verko aperos fine de aprilo.

Dum majo aperos la romano „Luno de Izrael", verkita de la mondkonata aŭtoro Sir Haggard kaj trad. de s-roj Payson kaj N. C. Butler.

Sukcesplena propaganda vojaĝo.

Adalbert Smit, dir. de Holanda E.-oficejo, el Hago ĵus revenis de granda propagandvojaĝo tra Anglujo. Li parolis pri Holando, holandaj kolonioj, holanda kaj E.-literaturoj kun belegaj lumbildoj.

Plej bone ilustras la grandan sukceson, ke oni jam nun preparas duan vojaĝon de Smit por aŭtuno.

Libertempa restejo.

Nia malnova samideano Bartel-Graz montris bonan vojon, havigi al samideanoj konvenan somerrestadejon samtempe propagante por E.

Skribu al hoteloj, gastejoj, privataj personoj, kie vi loĝis en la lastaj jaroj dum viaj ferioj, ke ili anoncu en A. E.

La prezo po foja anonco Ŝ 5.—.

AŬSTRIA ESPERANTO-DELEGITARO

Bisamberg bei Wien 248.

EDW. en sia 73a kunsido la 31. 3. elektis kiel novan prezidanton s-ron Fantello (Unuiĝo) kaj ekzekutivan komitaton okpersonan; decidis kunvoki okaze de la mortotago de Zamenhof la Wien-aj esp.-istoj antaŭ la memortabulo ĉe hotelo Hammerand, VIII., Florianigasse 8, la 15. 4. je la 11 h. Parolos germane s-ro Schade kaj E.-lingve s-ro Werner.

Graz: E.-Verein f. Stmk.: Okaze de la nunjara 800 jara jubileo de nia urbo ni preparas en konsento kun la UEA.-delegito eldonadon de gvidfolio tra Graz. Alilandaj samideanoj estas petataj helpi tiurilate per demandoj ĉe Stadtrat Graz aŭ ĉe Landesverband f. Fremdenverkehr, Graz, ĉu esperantaj gvidfolioj aŭ prospektoj estas haveblaj. Per ĉiu tiurilata skribaĵo al la diritaj adresoj vi helpas akceli decidon pri eldono.

Deutsch-akad. E.-Verein Graz: Post kelkfoja vana provo reorganizi la jam en la jaro 1908 fonditan germ.-akad. E.-Soc. Graz nun ĝi do denove ekzistas. Post multaj penadoj E.-Verein f. Stmk. kaj ties sekr. jur. W. Rogler sukcesis revivigi tiun societon, kiu antaŭ la milito estis altestimata E.-Societo en Graz. Preskaŭ ĉiuj anoj soldatiĝis dum la milito, multaj mortis sur la batalkampo, aliaj finstudadis kaj la iam vigla E.-societo disfalis. Dum la lernjaro 1926/27 prof. Hainschegg aranĝis fakultativan E.-kurson en la realgimnazio, Graz, Lichtenfelsgasse. Tiu semo nun elkreskis. La 21-an de Marto okazis la ĝeneralkunveno por la somera duonjaro 1928. Jenaj funkciuloj estas elektitaj: prez-o: jur. Wilibald Rogler, St. Peter bei Graz, Gartenstraße 11/2. 2-a prez-o: med. Wilfried Seemann, Graz, Humboldtstraße 13, sekr.-o: jur. Hans Niemetz, Graz, Wormgasse 8, kas-o: mech. Norbert Kunze, Graz, Grillparzerstraße 8.

Kunvenoj komune kun E.-Societo por Stirio, ĉiuĵaŭde je la 20-a en gastejo „Pastete". La membroj rajtas uzi la bibliotekon de la E.-Societo por Stirio je la samaj kondiĉoj kiel ties membroj.

Laŭ la statutoj la societo estas nacia, libereca kaj aria. La societo decidis provizore ne aliĝi al AED. aŭ DEB. aŭ UEA.

jur. W. Rogler.

Innsbruck: Vigla laboro. Esprimas grandan ĝojon pri farita Radio-parolado. Aranĝis funebran estrarkunsidon pro meritplena kolonelo Zwach. La 14. IV. Zamenhoffesto. S-ro Bederlunger mj. faris lumbildparoladon pri Zugspitze.

Liesing. La 22. marto prez. Steiner parolis germanlingve pri „Esperanto, ties graveco kaj disvastiĝo" en granda salonego de Bräuhaus. La lokaj gazetoj raportis pri tio. Nia samideano d-ro Scholz, iama deputito, meritas dankon pro la bona aranĝo.

Wien: Ĝendarma kurso estas fotografita. La bildo estas publikigita en „Volkszeitung" kaj „Kl. Volkszeitung". Grupo ĉe ĝendarmaro fondota. Kurso en la **lernejtaĉmento** de la policdirekcio estas fotografita kun komandanto pol. kons. Buchsbaum kaj kursgvid. ĉefinsp. Steiner.

Unua E.-Unuiĝo kunvenis la 27-an de marto la unuan fojon en sia nova hejmo Wien, I., Schellinggasse 12 (Kafejo Hofbauer). La kunvenoj okazos de nun ĉiun **mardon** je la 19-a horo.

E.-Societo „Konkordo" ŝanĝis la ejon kaj kunvenas ĉiuĵaŭde je la 19-h. en kafejo Aŭstria V., Margaretenstraße 33. Aranĝoj: 1. IV. gvidado tra antikva Wien, ptgm. gaja amuzo; 8. IV. paska migrado; 15. IV. migrado; 19. IV. je la 8. vesp. parolado de prez. Steiner pri „historio kaj evoluo de la mondhelplingvo"; 22. IV. vizitado de Stubenringsender, kunveno antaŭ la ministerio je ½10 atgm., kotizo 50 gr; 26. IV. amuza vesp.; 29. IV. migrado.

En Sovetio ekzistas 16.366 organizitaj esp.-istoj en 448 lokoj kun 527 E.-rondoj. Aperas 2 E.-gazetoj.

Rekomendindaj firmoj.

Bäckerei = bakejo: **Korneuburg.**
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.
Gemischtwaren = Diversaĵoj:
Alois Cisař, Bisambergstr. 21.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Radetzkystr. 6/III, Vereinsheim (kunv.) „Pastete", Sporg. 28, Do (ĵ) 20—23 h.

Innsbruck.

Arbeiter-Esp.-Klub (Laborista klubo), Südtiroler Platz, Hotel Sonne, Do (ĵ) 20—22 h.
Esperanto-Klub, Gasthof „Grüner Baum", Museumstraße. Mi (me) 20—22 h.

Wien.

Katolika Unuiĝo Esperantista en Wien, I., Freyung 6 (Pfarrkanzlei), Mi (me) 17—19 h.
I. Wiener Esp.-Verein, I., Schellinggasse 12, Kafejo Hofbauer, Di. (m) 19·30 h.
Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, III., Henslergasse 3, Hochparterre; Fr (v), 19—21 h.
Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17—19 h.
„Konkordo", IV., Margaretenstr. 33 (Kaffee Aŭstria) Do (ĵ) 20 h.
Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—22 h.
Esp.-societo „Danubio", VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—23 h.
Esp.-Bildungsverein „Supren", VII., Kaiserstraße 121, Café, Fr (v) 18—21 h.
Esp.-societo „Fideleco", Währinger Bürgercafé, XVIII., Staudg. 1, Di (m) 16—19 h.
Bohema Klubo Esperantista, XV., Turnerg. 9, I. et., Narodni dum, Mi (me) 20 h.

V. b. b.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.